

Heinrich Heine,

[En Majo, kiam
ĉiuj]

*tradukita de Manfred
Retzlaff*

En Majo, kiam ĉiuj
burĝonoj malfermiĝis,
en mia koro tiam
la amo ekfloriĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
birdetoj sin aŭdigis,
al ŝi deziron mian
sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana
poemo "[Im wunderschönen
Monat Mai]" de HEINRICH
HEINE (*1797-12-13 -
†1856-02-17) en Esperanton
de MANFRED RETZLAFF
(*1938-11-04).*

*Arg-556-1125 (2010-09-14
15:51:15)*

Heinrich Heine,

[En la monat' bele-
ga, Maj']

*tradukita de Ludwig Emil Mei-
er*

En la monat' beleg, Maj',
Dum ĉie brilas floro,
La amo ekvekiĝis, ja,
Ankaŭ en mia koro.

En la monat' beleg, Maj',
Dum la birdara kanto,
Mi ekkonfesis al ŝi, ke
Mi estas ŝin amanto!

*Traduko de la Germana poe-
mo "[Im wunderschönen Mo-
nat Mai]" de HEINRICH HEI-
NE (*1797-12-13 - †1856-02-17)
en Esperanton de LUDWIG EMIL
MEIER (*1847-02-16 - †1919).*

*Arg-556-1124 (2010-09-14
15:46:07)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun
ĉi tradukon el la libreto "H. Hei-
ne - Libro de Kantoj", eldonita
en 1911 de la "Esperanto-
Propaganda Instituto" (Leipzig,
Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldo-
no. [Sur la frontpaĝo de la kajero
estas malsupre indikita ankaŭ:
Eldonejo Rothermel, Friedrichs-
werth (Thüringen) kaj supre:
Popola Biblioteko Esperantista
n-ro 2.] La origina germana-
lingva versio de Heinrich Heine
troviĝas en ties verko "Buch der
Lieder", sekcio "Lyrisches Inter-
mezzo", sekcio I. - Informoj pri
la tradukinto Ludwig Emil Meier
troviĝas en la vikipedia retejo
[http://eo.wikipedia.org/
wiki/Ludwig_Emil_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier).*

Heinrich Heine,

[Im wunderschönen Mo-
nat Mai]

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Knospen sprangen,
Da ist in meinem Herzen
Die Liebe aufgegangen.

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Vögel sangen,
Da hab ich ihr gestanden
Mein Sehnen und Verlangen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 -
†1856-02-17).*

Arg-556-1123 (2010-09-14 13:07:49)

*Das Gedicht befindet sich in Heinrich
Heines Werk „Buch der Lieder“, im Ab-
schnitt „Lyrisches Intermezzo“, Nr. I.*